

# Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2008

## Okazintaĵoj

### Klubaj kunvenoj

Dum 2008 okazis entute 16 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa) kaj 2 estraraj kunvenoj. Ne okazis vortaraj laborkunvenoj en 2008. Kontraste al 2007, en 2008 GET ne partoprenis en la popola procesio la 17an de majo.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 4 kaj 9 membroj, meznombre 6,6 (meznombre en 2007: inter 6 kaj 7 personoj; en 2006: iom malpli ol 7). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklačo post la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al membroj praktiki la lingvon. La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo Populus. Temoj en 2008 estis:

- «Astronomio». Tamen ankaŭ temis pri meteologio.
- «Lojban»: pri la planlingvo loĵbano.
- «Kiu esperantolibroj estas maloftaj kaj multekostaj?»
- «La unua de aprilo»: pri la kutimo trompi homojn la unuan de aprilo. Kromtemo estis onta vojaĝo al Pollando.
- «La intonacio de aviadilaj stevardinoj»: fonologia analizo de tiu fenomeno.
- «La germana kanzonisto Reinhard Mey»: prezento de la kanzonisto kaj pluraj el liaj kanzonoj.
- «Wikipedia»: prezento pri la interreta enciklopedio. La klubanoj eĉ korektis informojn tie.
- «La UK-urbo Roterdamo»: prepare antaŭ la Universala Kongreso tie.
- «Bondeungdomslaget i Nidaros»: pri la historio kaj aktivado de la organizo.
- «Raporto pri la suneklipso en Sibirio»: pri suneklipsoj, precipe pri la aŭgusta suneklipso kaj pri vojaĝo al Sibirio por observi ĝin.
- «Io kion mi vidis/aŭdis/spertis hieraŭ»: La membroj senprepare rakontis pri io kion ili spertis dum la lastaj tagoj.
- «Vojaĝoj»: pedagogia maniero paroligi homojn grupe pri vojaĝoj ktp.
- «Kio estas lingvo? Kio estas lingvistiko?»: pri la naturo de la fenomeno «lingvo» kaj pluraj el ties multaj flankoj.
- «Artikoloj en la periodaĵo Arbeidervern»: strangaj, amuzaj kaj malamuzaj anekdotoj pri protektado de laborantoj.
- «Sud-Pollando»: raporto pri vojaĝo.
- «Ĉu ekzistas adjektivoj? Ĉu ekzistas eraroj?»: provo konvinki la membrojn ke la respondo ne estas simple «jes».

Aldone al tiuj kunvenoj okazis neoficiala kunveno la 21an de majo, kiam belgaj esperantistoj manĝis kune kun GET-anoj en la kafejo Ni muser. Ne-protokolita estas la renkonto inter GET-anoj, japana esperantisto kaj lia ĉina amiko en Tyholtårnet la 23an de aŭgusto.

## **Landa aranĝo en Trondheim**

La 13an de decembro okazis la landa seminario de NEL. Ĝi temis pri herboj kaj bildstrioj, kaj okazis en la universitata centro en Dragvoll. Tie partoprenis pluraj GET-anoj, kaj oni dissendis la seminarion per reta televido. Post la seminario la partoprenintoj iris al la Zamenhofa festo, kie partoprenis entute 12 personoj. Ankaŭ ĝin oni dissendis per interreta televido.

## **Varbado, kursado kaj informado**

En 2008 oni nek varbis nek aranĝis kursojn nek informis aktive pri Esperanto aŭ GET.

## **Membrostatistiko**

Fine de 2008 GET havis 21 membrojn (2007: 23; 2006: 25).

## **Partopreno en naciaj aranĝoj**

Kvin GET-anoj (inter ili unu kiu ne plu loĝas en Trondheim) plene ĉeestis en la NEL-seminario, kiu okazis en Trondheim la 13an de decembro. Aldone unu GET-ano ĉeestis parte. Pluraj el la GET-anoj ankaŭ partoprenis programe aŭ administre: Ulf Lunde (nun loĝanta en Os) kaj Judith Parelle Abrahamsen prelegis pri bildstrioj, Jardar Eggesbø Abrahamsen mastrumis la ejon kaj la retan dissendon.

## **Partopreno en internaciaj aranĝoj**

Tri GET-anoj (Christian Fossen, Torstein Kvakland kaj Tomas Jansson) aliĝis kaj vojaĝis al la Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo. Aldona GET-ano (Knut Lyngstad, loĝanta en Bruselo) ne aliĝis sed tamen iris al Roterdamo kaj renkontis esperantistojn.

Dum la printempo la esperantoklubo de Darmstadt (Germanio) iniciatis amikajn rilatojn kun GET, kaj invitis la GET-anojn al aranĝo en Darmstadt. Neniu GET-ano vojaĝis.

## **Vortara laboro**

En 2008 ne okazis laboro pri la nova vortaro, ĉar la responsulo pri la praktika laboro, Kjell Heggvold Ullestad, devis doni prioritaton al alia laboro. Kunordiganto pri la vortara laboro de GET estis ankaŭ ĉi-jare Herman Ranes.

## **Interreta aktivado**

GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar Eggesbø Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Li ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith Parelle Abrahamsen administris la NJE-liston kaj la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 25 en la retpoŝta listo de GET (26 en 2007, 24 en 2006). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2008 sendiĝis ĉ. 50 mesaĝoj per la listo.

Por la unua fojo en la historio de GET oni dissendis klubkunvenon per reta televido (la 30an de septembro, la kunveno «Io kion mi vidis/aŭdis/spertis hieraŭ»). Tio okazis kiel teĥnika provo antaŭ la seminario de NEL. Ankaŭ la seminario kaj la Zamenhofa festo dissendiĝis per interreta televido. La dissendojn mastrumis Jardar Eggesbø Abrahamsen.

## **Biblioteko**

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes. Ankaŭ ne en 2008 okazis pruntedono. La biblioteko kreskis per artikolo tradukita de Odd Tangerud kaj per kopio de la bildstrio «Tiu diodieca sribajo» de Christopher Nielsen.

## **Arĥivo**

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

## **Pasporta servo kaj aliaj vizitoj**

PS-gastigantoj en Trondheim estas Ulf Stenhaus kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Herman Ranes, kiu ne estas PS-gastiganto, gastigis litovan gaston por Ulf Stenhaus.

Einar Faanes ne estas PS-gastiganto, sed gastigis du belgojn. Einar Faanes mem utiligis Pasportan Servon en Germanio.

## **Postenoj**

### **Estraro dum 2008, elektita de la Jarkunveno la 19an de februaro**

Prezidanto: Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)  
Vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)  
Sekretario: Einar Faanes (nova)  
Kasisto: Ulf Stenhaus (reelekto)  
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)

La sekretario forlasis Trondhejmon post la somero. Jam komence de junio Jardar Eggesbø Abrahamsen ekfunkciis kiel sekretario.

### **Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 19an de februaro**

Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)  
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)  
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)  
Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)  
Vicrevizoro: Arne Olav Mjøen (nova)  
Elekta komitato: Torstein Kvakland (reelekto) kaj Judith Parelle Abrahamsen (reelekto)

### **Eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj**

Prezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen  
Sekretario de NEL: Ulf Lunde  
Vicrevizoro de NEL: Ulf Stenhaus  
Prezidanto de NJE: Judith Parelle Abrahamsen  
Sekretario de NJE: Einar Faanes  
Revizoro de NJE: Arne Olav Mjøen  
Prezidanto de Legaco Uhlen: Christian Fossen  
Estrarano de Legaco Uhlen: Arne Olav Mjøen, kun persona anstataŭanto Torstein Kvakland

Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen  
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad  
Estrarano de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj: Torstein Kvakland (ĝis julio)

### **Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj**

Elekta komitato de NEL: Judith P. Abrahamsen, Knut Lyngstad  
Domkomisionanoj por NEL: Torstein Kvakland, Herman Ranes  
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen  
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland  
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen  
Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland  
Respondeculo de la TTT-paĝaro de NJE: Judith Parelie Abrahamsen  
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug  
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland  
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Lunde (komputiko), Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingviko) kaj Tomas Jansson (onkologio)  
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith Parelie Abrahamsen (nur n-ro 1, poste muntis nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)  
Paguta laborunto de la redakcio de la nova vortaro: Kjell Heggvold Ullestad  
Aliaj membroj de la redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman Ranes

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.  
Aprobata de la Jarkunveno de GET la 17an de februaro 2009.